


POST LA FAJREGO EN LA SUBTERA ARBARO...
RAVELIN ĈESIS PAROLI.
ILI APARTIĜIS IOM POST IOM.
KIAL MI KRIIS LA NOMON DE JOHANO KIAM LA ARBO FALIS?
KIAL MI NE KRIIS LA NOMON DE RAVELIN...?


ĈU LI ANKAŬ AMAS MIKAELINON?
ĈU MIA FRATO ESTAS LA ULO, KIUN ŜI AMAS?
LAŬRA... MIKAELINO ESTAS NIA GASTO. KIAL ŜI DEVAS HELPI VIN?
MIKAELINO, ĈU VI REPRENOS LA MANĜILARON KIAM ONI FINOS MANĜI?
NE, RAVELIN! MI PETIS AL LAŬRA, KE ŜI INSTRUU AL MI ALMENAŬ LA BAZAJN HEJMAJN AFEROJN.
ONI JA NE POVAS FIDI STEFANINON PLU!
HA HA HA! TRE TAŬGE POR ŜI... ESTAS DECIDITE: MIKAELINO IAM ESTOS LA ĈEFSERVISTO DE LA FAMILIO LANTOO!
JES, FRAŬLO. NE PENSU, KE MI DEVIGAS ŜIN LABORI...


FRATO, ĈU VI VOLAS, KE ŜI FARIĜU NIA SERVISTO?
HO... NE GRAVAS ĈU MI VOLAS AŬ NE... ŜI MEM REVAS ESTI SERVISTO!
SED, FRATO...
NU, MI VOLAS LEGI LIBRON. PARDONU MIN...
HE! ATENDU!
KIO OKAZAS NUN? ĈU VI HAVAS ION POR DIRI?
VI AMAS ŜIN...
ESTAS SENUTILE KAŜI TION. MI JAM SCIAS ĈION!
PRI KIO VI PAROLAS?
VI ENAMIĜIS AL ŜI, ĈU NE?
VI AMAS MIKAELINON!


MI NE MEN-SOGAS. MI ŜATAS ALIAN INON JAM DELONGE!
TIO ESTAS MEN-SOGO!
TUTE NE!
HA!
VI MEN-SO-GAS!
EN ORDO! MI TUJ MONTROS ION AL VI...
...
VI TUTE ERARAS. ESTAS ALIA MIS-TERA VI-RINO...
SED... JOHA-NO?!
HE, STEFANINO! MIA PRINCINO!


HA!
HE!! KION VI FARAS? ESTIS TIEL SUBITE!
PARDONU... MIA FRATO VOLIS EKSCII, KIU ESTAS LA INO, AL KIU MI FRENEZE ENAMIĜIS.
HA... HA...
ĈU VI NE AMAS MIN, STEFANINO?
KI... KION VI DIRAS?!
HE HE... KIAL MI NE AMUS VIN, JOHANO?
VI JA ESTAS LA PLEJ AĜA FILO DE LA BIENPOSEDANTO...


EN ORDO, JOHANO...
MIKA-ELINO!
KIAL MI ELVERŜAS TIOM DA LARMOJ?!
MIKA-ELINO!
JO-HA-NO!
LI AMIS STEFANINON EKDE LA KOMENCO!


KIAL MI FARIS TION?!
RAVELIN JA ESTAS TIEL AFABLA KIEL ĈIAM...
SED NUN LI ESTAS IOM PLI MALĜOJA OL ANTAŬE...
IU AJN POVUS SUFIĈI EN TIU MOMENTO... ESTIS NUR KOINCIDO, KE STEFANINO APERIS.
ESTAS MALFACILE RIGARDI LIAJN OKULOJN SOLECAJN.
KAJ LI NE ZORGAS PRI MI KIEL ANTAŬE...!
HA HA! FINFINE!
NENIU VIRO REZISTAS AL MIA ĈARMO!




LI MOKIS MIN ĈIUN TAGON ĈAR LI ESTIS ENAMIĜINTA AL MI!
PAĈJO, ESTU TRANKVILA. TIU DOMEGO BALDAŬ ESTOS NIA! HA HA!
EKDE TIU TAGO, STEFANINO KOMENCIS PIGRI EĈ PLI OL ANTAŬE.
ŜI EKSEKVIS JOHANON KVAZAŬ ŜI ESTUS LIA OMBRO.
AŬSKULTU, JOHANO...
BALDAŬ OKAZOS LA NEĜFESTO EN LA VILAĜO...
NI IRU KUNE!
JES...
DUM LA NEĜFESTO, VI DANCOS NUR KUN MI...
LA VILAĜANOJ SURPRIZIĜOS. ESTOS LA UNUA FOJO, KE LA PLEJ AĜA FILO DE GUSTAVO LANTOO ĈEESTOS LA NEĜFESTON.
LA NEĜFESTO EN LA VILAĜO.


FESTO, EN KIU ĈIUJ VILAĜANOJ BONVENIGAS VINTRON.
MALGRAŬ MIAJ PETEGOJ, MIA PATRO NE PERMESIS AL MI ĈEESTI LA FESTON KIAM MI ESTIS INFANO.
LA INOJ DE L' VILAĜO KREVOS PRO LA ENVIO... HA HA HA!
MI VOLAS LEGI. ĈU VI POVUS LASI MIN TRANKVILA, STEFANINO?
HO, EN ORDO...
BLA BLA
ĈIUJ JUNAJ VIROJ VOLAS UMI KUN MI. KIAM MI APEROS KUN KORAMIKO, ĈIUJ SENILUZIIĜOS... ILIAJ KORETOJ ROMPIĜOS!
STEFANINO FANFARONAS PRI LA JENO: ĈU VI VERE IROS KUN ŜI AL LA NEĜFESTO?
JES JA...
MI DO VOLAS INVITI MIKAELINON!
HE, JOHANO...


MIKAELINO ESTAS EN-AMIĜINTA AL VI!
A HA... TRE BONE.
SED SCIU, KE...
SED IAM ŜI ENAMIĜOS AL MI... JES JA, PROMESITE!
VI VIDOS, KE ŜI EN-AMIĜOS AL MI!
BUM


VE, LA FESTO JAM KO-MENCI-ĜIS!
MI FARAS ĈION, KION STEFANINO DIRAS...
EK! NI DANCU, JOHANO!
NUN MI ESTAS TRE SIMILA AL PUPETO POR ŜI...


HO! RIGARDU!
VENIS LA FRAŬLOJ LANTOO! RIGARDU!
FRAŬLOJ, NI ELKORE BONVENIGAS VIN.
ESPEREBLE VI AMUZIĜOS, SINJORETO JOHANO!
KIA MIRINDAĴO! HA HA HA! LA VIZAĜOJ DE ĈIUJ JUNAJ VIRINOJ...
NE ĈESU ENVII MIN, KAREGAJ.
JOHANO SENPROKRASTE PETOS, KE MI FARIĜU LIA EDZINO...
EKSONIS MUZIKO! NI DANCU!
EK! ANKAŬ NI DANCU, MIKAELINO!


MIKAE-LINO...
HO, TIU INO...
KIU ESTAS LA INO DAN-CANTA KUN FRAŬLO RAVELIN?
KIO?!
DRINKU! DRINKU!
NUR ĈI-NOKTE!
DRINKU KAJ MANĜU SENLIME!


ĈI JA ESTAS EGALA AL TIU ALIA VIRINO!
HO, HINDLO! TIU JUNA VIRINO LOĜAS EN LA DOMEGO DE LA FAMILIO LANTOO.
ĈIA NOMO ESTAS MIKAELINO.
KAJ ONI DIRAS, KE LA PLIJUNA SINJORETO ENAMIĜIS AL ĈI...
MI-KAE-LI-NO!
SE VI VOLAS, KE ĈI ESTU VIA MODELO POR IU PENTRAĴO... FORIGU TIUN IDEON EL VIA KAPO!
SINJORETO RAVELIN TRO ŜATAS ĈIN. LI NE PERMESUS, KE VILAĜA AMATORO PENTRU ĈIN!
NE EBLAS...
MIKAELINO...
LA FAMILIO LANTOO...
NUR DUM ĈI TIU NOKTO... NE RIGARDU MIAN FRATON....
NUR ĈI-NOKTE... PENSU PRI MI, RIGARDU MIN!
KI... KIO?
MIKAELINO...


RAVELIN NE PERMESOS TION! MI IROS HEJMEN.
HO VE, JOHANO! ATENDU, JOHANO!
JOHANO, FORPELU MIKAELINON EL VIA BIENO, MI PETAS...
MIKAELINO ESTAS MORNA, MALŜATINDA...
POST LA NEĜFESTO, LA NEĜO DEGELIS. KVAZAŬ ĈIO ESTUS PARTO DE LA SAMA TUTO.
PRINTEMPO ŜTELECE APERIS KAJ EN LA VILAĜO KAJ EN LA DOMEGO DE LA FAMILIO LANTOO.
BAC
SED... KION JOHANO CELAS?!
DUM KIOM DA TEMPO MI DEVOS ATENDI?
LI DIRIS, KE LIA AMO AL MI ESTIS FEROCA KAJ ARDA.


KLAK
LI KISIS MIN NUR UNU FOJON, KAJ LI NE EĈ PRENAS MIAN MANON!
KAJ LI ANKORAŬ NE DIRIS, KE LI AMAS MIN...
HO VE, MI BEDAŬRAS! LA TELERO ELGLITIS EL MIAJ MANOJ!
HO, VI HAVAS MALBONAN ASPEKTON, STEFANINO...
KIO OKAZIS AL VIA REVO IĜI POSEDANTO DE LA FAMILIA DOMEGO?
KOMPRENEBLE MI DEVAS FARI ION...
MI NE POVAS PERMESI, KE ĈIO ĈI FINIĜU SEN KLARIGO...


HEL-
PON!
HEL-
PON!
MI-
KAE-
LI-
NO!!
KIO
OKAZIS,
LAŬRA?
FRAŬLO!
MIKAE-
LINO...
MI-
KAE-
LI-
NO...
ŜI PROMENIS SUR LA GLACIIĜINTA LAGO, SED LA GLACITAVOLO ESTAS TRO MALDIKA!


KRAK
JO... JOHANO!
MIKAELINO!!
ESTAS DANĜERE! SE VI ALPROKSIMIĜAS, LA GLACIO ROMPIĜOS!
VE!
NE MOVU VIN! LA GLACIO ROMPIĜOS!
LA AKVO ESTAS GLACIE MALVARMA! ŜI MORTOS!
NI BEZONAS BOATON... NE! ION LONGAN! NI BEZONAS BRANĈON AŬ ION SIMILAN.



SI... SINJORETO!
ŜI PROMENADIS... ŜI VIDIS SCIURON, KIU BARAKTIS SUR LA LAGO...
ŜI VOLIS HELPI LA SCIURON, SED...
KRAK
AAAA!
ESTAS TRO DANĜERE! NE FARU TION!
ROMP
ŬAAA!
MIKAELINO, AŬSKULTU MIN! MI NE POVAS PROKSIMIĜI AL VI!
MI PUŜOS LA GLACIPECON, SUR KIU VI STARAS! MI PUŜOS ĜIN AL LA PLEJ PROKSIMA BORDO! NE MOVU VIN!


PLAŬ
ESTAS EVIDEN-TE..!
LI JA AMAS MIKAE-LINON.
JOHA-NO...!
HO VE, FRAŬ-LO...!
JO-HA-NO!
NE!! JOHANO, MALFER-MU LA OKULOJN!
FRAŬ-LO...
JOHANO, VI JA FARIS TION...
MI ĜOJAS, KE VI BON-FARTAS, MIKAE-LINO.



MIKA-ELI-NO...
MI... MI...
NE PA-RO-LU!
RESTU SILENTA, JOHANO.